



Kvankam ĉe multaj ankoraŭ la neĝo ne peris kaj la vetero restas varma (almenaŭ tielas en Stokholmo), tamen glitvenas la vintro. Ĉu manke ĉu ne, pensoj ĉi-sezone sin turnas al vintraj fenomenoj.

Ĉi-numero de *Inter Ni Dirite* temas pri aferoj vintrorilataj. Mi esperas ke vi ĝuos kaj ilin kaj la vintron kaj ties kunligaĵojn.

– Einar

inter ni dirite

LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Einar Faanes – Muntis: jpa

La norda lumo

- *Aurora borealis* estas la latina nomo de la natura
- fenomeno, kiu okazas en la arktaj regionoj. La
- antarkta fenomeno nomiĝas *Aurora australis*. Oni
- ankaŭ nomas ilin nordaj respektive sudaj lumoj. La
- ĉielo verdiĝas kaj eĉ ruĝiĝas. Sed kio okazas? Ŝargitaj
- sunventaj partikloj trafas la magnetkampon. La nor-
- daj lumoj kutime videblas norde de 60° en la vintro.
- Teorie, oni povas vidi ilin ankaŭ en somero, sed
- tiam ne estas sufiĉe malhele. Oksigenaj atomoj 100
- kilometrojn alte kaŭzas la verdan lumon, ruĝa lumo
- devenas de oksigenatomoj en 200-kilometra alto.
- Nitrogeno kaŭzas violkoloran kaj bluan lumon. Tiajn
- kolorojn oni vidas nur dum granda sunaktiveco.
- Ĝis hodiaŭ oni ne ekzakte povas klarigi la ekeston
- de nordaj lumoj. En la mezepoko oni kredis, ke
- nordaj lumoj profetas malfeliĉegojn. La sangruĝaj
- lumoj plifortigis tian impreson. La vikingoj kredis,
- ke la lumoj estas signo, ke oni venkis en grandan
- batalon ie: La lunlumo reflektiĝas en la batalulaj
- kiraso kaj kaŭzas la lumfenomenon. Hodiaŭ, la
- homoj tre ŝatas la lumojn. Multaj aziaj turistoj venis
- al norda Norvegio pro la lumoj. Ili kredas, ke infanoj
- koncipitaj sub nordaj lumoj estos tre feliĉaj.
- En la norda Norvegio, oni ofte sukcesas rigardi
- la kolorplenajn fenomenojn. Se ne nubas, la verdaj
- bendoj serpentumas sur la ĉielo, aperas kaj mala-
- peras multfoje tre subite. Se vi ne jam rigardis ilin, vi
- povas fari tion dum la norda-luma renkontiĝo! NJE
- aranĝos kabansemajnfinojn apud Tromsø en norda



Norvegio de la 24a ĝis la 26a de februaro. Neĝos, nordlomos kaj ni povos glitveturi, konstrui neĝulojn kaj neĝulinojn aŭ simple ludi ludojn malekstere, se neĝŝtormos. La kabano ankaŭ enhavas saŭnon. Ni iros tien vendrede kaj reiros al Tromsø dimanĉe. Eblas veni pli frue aŭ resti pli longe en Tromsø, se vi deziras.

Amelie Matt

fonto: <http://de.wikipedia.org/wiki/Polarlicht>



La norda lumo. Fotis: nb_harsta ĉe Flickr (CC-BT-NC-2.0)

Sep specoj de julaj kukoj, Esperantlingve

Baldaŭ venos la julo, kaj kun ĝi festoj, endomaj arboj, kaj kuketoj. En la skandinavaj landoj ni manĝas kuketojn, ofte spicitajn. Tamen manĝi tiajn estas relative nova moro, oni tradicie diras ke bakendas sep specoj de kukoj. Normo ne ekzistas tamen pri kiuj oni baku, kaj tio multe varias laŭ ekz. regiono. Dum la lastaj jaroj kukoj malsimilaj al la tradiciaj malmolaj keksoj iĝis pli oftaj pro novaj influoj. Ekzemple, usonstilaj taskukoj ("cupcake") kun tradiciaj julspicoj estis aĉeteblaj dum la lastaj jaroj.

Grava demando estas: dum la Zamenhofa

festo, kion diros vi kiam vi deziras la julkukojn ĉe la alia flanko de l' tablo? Jen mi prezentas nomsugestojn por sep de la plej oftaj julkukoj. Kiun nomon uzos vi por diversaj julkukoj? Ĉu vi havas aliajn sugestojn? Kiujn kukojn bakos vi por la jula festo?

Smultring – *Grasringo*

Sandkake – *Sablokuketo*

Sirupssnipp – *Siroplato*

Berlinerkranser – *Berlina kravato*

Goro – *Ornamplato*

Krumkaker – *Krispkonuso*

Fattigmänn – *Riĉiga kuko / Grasvolvaĵo*

PONDUS

© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com



n-ro 37